tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

septembro 2011
n-ro 111



- ★ Ni kongresis en Kopenhago, Olomouc, Sarajevo, Kijivo...
- ★ Subvencio Cigno 2011 venas al Đurđevac
- ★ Septembre Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj en Hrašćina
- ★ Koprivnica – la kongresurbo de kroataj esperantistoj en junio 2012

Karaj legantoj!

Ni havas tre sukcesan **9an kongreson de kroataj esperantistoj** en **Bjelovar** malantaŭ ni kaj multaj daŭre ĝuas la belajn prikongresajn fotodokumentojn de la bjelovara filmisto **Jozo Lovrić**, dokumentinta la disvovolviĝon en la ĉarma kongresa urbo, kiun maje vizitis ducento da kongresanoj. Legu pli en la artikolo de **Zlatko Tišljar.**

En majo sukcese okazis **scikonkurso por gelernantoj** en **Kostrena** kaj **Meteorita festo** en **Zagorje**. Pri Kostrena per foto informas Boris Di Costanzo.

La 20a de aprilo 2011 kiam okazis la jarkunveno de **Esperanto-Societo "Bude Borjan"** komenciĝis la malgaja procedo: malfondo de la **Esperanto-Societo "Bude Borjan"**. Legu pli ĉi-numere!

La 14an de junio la urbo **Vrbovec** omaĝis al sia samurbano, Esperanta poeto **Josip Velebit**, starigante murtabulon honore al lia instruado en la mezlernejo de **Vrbovec**. La **Ronda Tablo** pri la vivo de **Josip Velebit** ne mankis. Lian Esperantan agadon prilumis **Spomenka Štimec**, dum multaj prelegintoj prezentis lian kulture riĉan vivon kaj kontribuon al la kroata literaturo. Vidu la memortabulon kiu sur la mezlernejo en kiu **Josip Velebit** instruis, memorigas pri lia agado de instruisto, poeto kaj esperantisto. Fotis **Željko Gubijan**. La 18an de junio ni havis en **Zagrebo** la **regulan jarkunvenon de Kroata Esperanto-Ligo.**

Junio 2011 estis grava dato por la tuta Kroatio: finiĝis intertraktado de **Respubliko Kroatio** kaj **Eŭropa Unio** kaj en **Bruselo** estis anoncite ke **Kroatio** povus fariĝi la oficiala membro de **EU** en 2013!

Julie venis tempo de la **67a Internacia Junulara Kongreso** en **Hlibivka** en **Ukrainio** (kiun partoprenis bedaŭrinde nur unu kroata esperantisto, **Krešimir Jerić** el **Rijeka**, kiu disponigis al ni sian foton pri la evento). Sekvis **Olomouc** en **Ĉeĥa Respubliko** kiu gastigis **Kongreson de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj**, al kiu kontribuis ne nur ties sekretario **Dragan Štoković** sed prelege ankaŭ **Antun Kovač**. Allogis **ILEI-konferenco** en **Kopenhago**, pri kiu ĉi-numere raportas **Zlata Nanić**. Samurbe ni spertis tre riĉan **96an Kongreson de Esperanto**. El ĝi **Josip Pleadin** kaj lia **Dokumenta Esperanto-Centro** revenis kun mona **Subvencio Cigno**! Ni gratulas! En la kongresa libroservo troveblis pliaj du libroj, kiuj dokumentas nian laboron: en la festlibro okaze de 70-jariĝo de **D-ro Detlev Blanke** (red. **Sabine Fiedler**) aperis la artikolo pri la **Zagreba Metodo** de **D-ro Velimir Piškorec**. En **Esperantologio**, Kajero 5 por 2011(red. **Christer Kiselman**) kaj eldonita de **KAVA-PECH** en **Dobřichovice** en **Prago**, estis eldonita kontribuo de **Spomenka Štimec Unu hindunia infanlibro en Eŭropo, tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio**, prezentita dum la **Universala Kongreso de Esperanto** en **Havano** en 2010.

Pluraj aktivuloj el diversaj landoj ekorganiziĝis en **Kopenhago** por omaĝi en 2012 al la 100-jara jubileo de la naskiĝo de esploristo kaj zagreba studento **Tibor Sekelj**. Okaze de la jubileo de **Tibor Sekelj Eŭropa Esperanto-Unio** deklaris la jaron 2012 **La jaro de Tibor Sekelj**. **KEL** ankaŭ preparos plurajn aranĝojn kaj tute aparte stimulis zagreban **Etnografian muzeon** organizi grandan ekspozicion pri la objektoj el la postlasaĵo de **Tibor Sekelj**, kunlaborante kun la **Urba muzeo** en **Senta**, en **Serbio**, kie la kolekto de **Tibor Sekelj** troviĝas, donacita de lia vidvino **Erszébet Sekelj**.

Dum ni kongresis en **Kopenhago**, la unua lernolibro de Esperanto atingis sian **124an datrevenon**! Zagrebe **Lucija Borčić** la 26an de julio atingis belan jubileon: 90-jariĝon! Tre kore ni gratulas, per la rozo sur la titolpaĝo. Fotis Jasminka Štimac.

De la 16a ĝis la 23a de julio **Zagrebo** gastigis la **64an kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista** prizorgita de **Marija Belošević**. La trideko da kongresanoj vizitis **Križevci, Ludbreg, Vrbovec, Krašić** kaj **Sisak.**

Sarajevo allogis aŭguste per la ĉarmetosa **SAT-kongreso** al kies kultura programo kontribuis el **Kroatio Spomenka Štimec** kaj **Dinko Matković**.

Kroata Esperanto-Junulara Asocio kaj ties prezidanto **Divo Pulitika** havis multajn zorgojn ĝis glate finiĝis la ĉi-jara aŭgusta junulara renkontiĝo **MIRO** en **Stara Sušica**, pri kiu raportas **Maja Valentić**. Studento **Kruno Puškar** ne ripozis: ankaŭ ĉi-jare li instruis Esperanton en **urba biblioteko** de sia urbo **Križevci** por ĉ. 25 gejunuloj.

Esperanto-Societo el **Sisak** kun ties prezidanto **Srećko Radulović** realigis la trian sestagan **Boatadon sur la rivero Kupa**, de la 31a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 2011.

Ne ĉiu kiu restis hejme ripozis de Esperanto. En **Kroatio** estas ĉi-somere preparataj tri diplomlaboraĵoj por la universitataj kursoj pri interlingvistiko en la universitato **Adam Mickiewicz** en **Poznań**, en la kursaro de **D-rino Ilona Koutny**. La diplomlaboraĵojn preparas **Tea Radovanović** kaj **Marija Jerković.**

Zdravko Seleš, prezidanto de **Dokumenta Esperanto-Centro** aŭguste voĉdonigis la prezidantaron de **Kroata Esperanto-Ligo** pri la kongresurbo de la **10a kongreso de kroataj esperantistoj,** kiun volonte organizos **Dokumenta Esperanto-Centro.** Nia kongreso en 2012 okzos en **Koprivnica**! Ni ne havas klubon en **Koprivnica** kaj la organizajn laborojn prizorgos **Dokumenta Esperanto-Centro**, kunlabore kun la LKK-anoj de la bjelovara kongreso. Notu la datojn de la kongreso en **Koprivnica: la 22a ĝis la 24a de junio 2012**!

La iniciata komitato de la refondata **Esperanto-Societo Bjelovar** kunsidis en **Bjelovar** la 25an de aŭgusto kaj la societo havis la fondkunvenon la 10an de septembro 2011.

En **Ĉinio Shi Cheng Tai** jam ĉinigis la verkon de **Andelka Martić La Kapreolido Pirgo**, per la esperantlingva traduko de **Josipa Katunar**, kiun **KEL** disponigis al li.

En septembro okazis valoraj Esperantaj programoj: **Renkontiĝo de verkistoj** en **Hrašćina**, kun la ĉefa publika parto la 17an de septembro kaj la gasto **Mikaelo Bronŝtejn**. Pri ĝi ni raportos en aparta numero de **Tempo.**



Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXIX, numero 111 (2/2011), ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio de kulturo de Respubliko Kroatio.
Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Štimec.
Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, **tel:** (385 1) 4617550, **fakso** (385 1) 4619373, esperanto@zg.t-com.hr, **www.esperanto.hr - Kontribuis:** Lucija Borčić, Christer Kiselman, Višnja Branković, Nedžad Ibrašimović, Krešimir Jerić, Kikushima Kazuko Antun Kovač, Jozo Lovrić, Slobodan Kukić, Zdravka Metz, Branko Miljko, Anto Mlinar, Josip Pleadin, Dinko Matković, Vjekoslav Morankić, D-ro Velimir Piškorec, Robert Pontnau, Tea Radovanović, Julia Sigmond, Jasminka Štimac, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar, Maja Valentić, Mirjana Žeželj. **- Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Đurđevac, grafokom@kc.htnet.hr
Anonctarifo: 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR), 1/2 paĝo 500 kn 68 EUR, lasta titolpaĝo 2500 kn (328 EUR). Abono kvar numeroj jare 60,00 kn. Por eksterlando 10,00 eŭrojn. Unuopa numero enlande 15 kn, por eksterlando 3 eŭrojn.
La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

LA NAŬA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

La 14-an kaj la 15an de majo 2011 okazis **la 9a kongreso de kroataj esperantistoj** en urbo **Bjelovar**. Partoprenis preskaŭ ducent patoprenantoj kaj gastoj el deko da landoj. La karakterizo de la kongreso estis signifa partopreno de esperantistoj el preskaŭ ĉiuj respublikoj de la iama Jugoslavio kaj renkontoj post dudeko

Montkabana Renkontiĝo okazos apud **Jesenice** en **Slovenio**, prizorgata de **Vanja Radovanović** kaj lia teamo de **SEK** kaj **KEJA**. La **3a MEVO** en **Kvarnero** aranĝota de **Višnja Branković** invitas al **Opatija** kaj **Lovran** de la 14a ĝis la 16a de oktobro.

Ne mankis abunda somera informado:

La 21an de julio **Judita Rey Hudeček** estis intervjuita por **Radio Sljeme**. Ŝi havis la okazon reklami la junularan aranĝon **MIRO**.

Ni havis en la lasta tempo du TV-elsendojn pri nia agado: la 16an de aŭgusto la elsendo **Vijesti dana** de regiona **SRCE TV** el **Čakovec**, elmontris 3,5 minutan programon pri **Dokumenta Esperanto-Centro** en **Đurđevac**, de la aŭtorino **Lana Kasumović**. La TV-elsendo **Dobro jutro, Hrvatska** elsendis intervjuon kun **Judita Rey Hudeček** kaj **Zlatko Tišljar**, anoncante la aranĝon **MIRO** en **Stara Sušica**. La programo estis elsendita la 26an de julio kaj ni povis spekti ĝin ankaŭ en **Kopenhago**. Pluraj ĵurnalistoj publikigis pri la **Boatado sur la rivero Kupa**.

En **La Chaux-de-Fonds** en **Svislando** estis eldonita memorlibro omaĝe al **Claude Gacond**. Al ĝi **Josip Pleadin** kontribuis per eseo **Kritika analizo de la revuo La Suda Stelo**.

Kun ĝojo ni raportas ke de post la lasta numero de **Tempo** ni sukcese vendis nian ejon en **Velika Gorica** (por kiu **Kroata Esperanto-Ligo** havigis la monon per **Loterio de Kroatio** en 1985). Tial ĉi-numere vi legos pri **Nikola Šegota** el la plumo de **Zlatko Tišljar. Šegota** estis la prezidanto de **KEL**, kiu havigis por **KEL** la rimedon por la ejo. Vi komprenos ke la kunaa ekvivalento de 30.400 eŭroj, kiujn **KEL** akiris per la vendo, estas nia baza kapitalo, kiu proksimigos nin al finpagado de niaj kreditoj por la ejo en **Vodnikova** kaj ke tiu mono ne povas esti uzata por aliaj celoj. Rigardu la rubrikon pri via subteno de **Vodnikova!** Ĉiuj subtenantoj havu elkoran dankon !

Kiam tiu numero de **Tempo** eniras presejon multaj zagrebaj teatroj malfermas siajn pordojn al la **44a Pupteatra Internacia Festivalo** kaj la amaskomunikiloj anoncas ke tio estas la festivalo fondita de **Studenta Esperanto-Klubo** antaŭ 44 jaroj!

La somero de la jaro 2011 estis vere aparte riĉa! Ni bonvenigu niajn aŭtunajn aktivecojn.

S. Štimec



Ljerka Stilinović prezidis diligentan Lokan Kongresan Komitaton.
Fotis Jozo Lovrić

da jaroj de iamaj konatoj kaj amikoj. Interalie eblis revidi homojn kiuj ne partoprenis en E-aranĝoj de antaŭ 40 aŭ eĉ 50 jaroj. Okazis emociplenaj renkontoj kaj rerenkontoj.

Nepre menciindas escepte granda kaj sincera subteno al la kongreso far la urbestro **Antun Korušec**, kiun havigis la prezidantino de Loka Kongresa Komitato **Ljerka Stilinović.** Pro tio eblis programoj kiuj malofte estas je dispono al esperantistoj. La urba muzeo disponigis siajn ejojn por impona ekspozicio pri historio de E-movado en Kroatio (parte Jugoslavio) ĉefe el la kolekto de **Josip Pleadin. Pleadin** iniciatis la kongreson en **Bjelovar** kaj kiel LKK-ano sursultrigis grandan parton de la laboroj kaj ankaŭ animis multnombran kaj laboreman Lokan Kongresan Komitaton de bjelovaraj esperantistoj. Je la dispono de la kongresa programo estis tre bela urba kulturdomo kaj la kultura programo estis imprese abunda kiu signife kontribuis al la sukceso de la kongreso.

En la malferma parto interalie parolis la urbestro **Antun Korušec**, prezidantino de **KEL**, **Judita Rey Hudeček**. Multaj reprezentantoj de la kroatiaj societoj kaj kluboj adresis siajn salutojn kaj la subskribinto salutis kiel sekretario de **Eŭropa Esperanta Unio** kaj parolis pri pri celoj de **EEU** en **Eŭropa Unio**.

La kongreso okazis sub la signo de 100-jariĝo de unua tradukita literaturaĵo el la kroata lingvo al Esperanto, la romano de kroata verkisto **August Šenoa La trezoro de l' oraĵisto**. La tradukon efektivigis Bjelovarano **Fran Kolar Krom**, eldoninto de la libro en 1911. Li meritiĝis kiel fondinto de la **Bjelovara E-societo**. Lia nepino **Mirjana Hnilička** estis kongresa gasto. La kongresan programon gvidis **Etel Zavadlav** kaj **Vida Jerman**.

Pro kultura ero al kiu la kongreso en Bjelovar omaĝis, pluraj eroj de la kongresa programo rilatis al literaturo kaj libroj. Aparte sukcesa estis kontribuo de junaj bjelavaraj muzikistoj kaj muzika ensemblo **Golub**, kies kontribuo omaĝis al sia fondinto profesia muzikisto, esperantisto, bjelovarano **Dragan Štokić**. La muzika programo ne mankis montri al ni ankaŭ la kulturon de la loka minaritato - la ĉehan kulturon. En **Bjelovar** renkontiĝis do multaj lokaj kulturuloj kun nia Esperantlingva kulturo. Grupo de bjelovaraj mezlernejanoj prezentis spektakleton el la libro de **Šenoa**, prizorgita de **Marko Dragičević** kaj **Marija Horvatić-Kapelac**. Aktorino **Vida Jerman** recitis el poezio de **Vesna Parun** de pluraj kroataj tradukistoj.

Zdravko Seleš prezentis du novajn librojn, la esperantigitan porinfanan libron **Pirgo** de **Anđelka Martić**. La aŭtorino **Anđelka Martić** persone ĉeestis la solenaĵon. **Pirgon** tradukis **Josipa Katunar** el **Rijeka**. La kongresa programo lanĉis la kroatlingvan tradukon de la libro de hungara verkisto **Géza Gárdonyi Sklavoj de Dio**. La hungaran libron el Esperanto kroatigis kaj financis la eldonon de la verko **Aleksandar Kocian** el **Osijek**. Ambaŭ verkoj mendeblas ĉe la eldonisto **Grafokom** en **Đurđevac. Spomenka Štimec** prezentis esperantlingvan version de **La Vivo de Damoru**, la verkon tradukitan el la bengala lingvo de **Malasree Dashgupta**.

En la densa kongresa programo ne mankis eĉ la teatraĵo: **Saša Pilipović** kaj **Mićo Vrhovac** ludis parton el la spektaklo **Dek tagoj de kapitano Postnikov**, kreita baze de la libro de **Mikaelo Bronŝtejn**. Kelkajn kantojn kantis **Neven Mrzlečki**, operkantisto kaj originala Esperantlingva verkisto kaj komponisto.

Aparte interesa estis la fakto ke malgraŭ la glora pasinto de Esperanto en **Bjelovar**, nuntempe ne ekzistas tie Esperanto-societo, tamen ekzistas sufiĉe multaj esperantistoj kiuj konsistigis LKK-on por la kongreso kaj tre sukcese organizis ĉi tiun kunvenon. **Josip Pleadin** estis tre bona motoro de la evento kaj **Ljerka Stilinović** kiel prezidanto de LKK kun aliaj LKK-anoj kapablis animi multajn lokajn fontojn.

La dua kongresa tago la 15an de majo gvidis la kongresanojn en du aŭtobusoj tra la regiono de **Bjelovar**, dank' al malavara helpo de **Departamento Bjelovarsko-bilogorska**. La celo, memorloko de infanliteratura verkisto **Mato Lovrak** en **Veliki Grđevac** memorigis multajn el ni pri liaj verkoj, el kiu **Kamaradaro de Petro Nodeto** legeblas ankaŭ en Esperanto, tradukita kaj eldonita de **Josip Pleadin**. La kongreso kaj ekskurso estis ankaŭ okazo por diskutoj kun homoj el diversaj landoj.

La bjelovara filmisto **Jozo Lovrić** kreis abundan dokumentadon pri la kongreso en **Bjelovar**.

La agado pri la kongrespreparoj spronis bjelovarajn esperantistojn refondi sian societon kaj engaĝiĝi venontjare pri la **10a kongreso de kroataj esperantistoj** planata en **Koprivnica**.

Zlatko Tišljar

NIKOLA ŠEGOTA KAJ ESPERANTO

Komence de decembro 1981 delegitaro de Kroatia Esperanto-Ligo kaj Internacia Kultura Servo (**J. Brkanac, E. Bečić, J. Rey** kaj mi) vizitis en la parlamento de Kroatio ties vicprezidanton **Nikola Šegota** t.e. la prezidanton de unu el la parlamentaj ĉambroj (Soci-politika konsilio) kun la peto fariĝi en la nova mandato (ekde printempo 1982) prezidanto de **Kroatia Esperanto-Ligo** (KEL). Ni sciis, ke li lernis Esperanton antaŭ la dua mondmilito kaj plurfoje montris simpation al nia movado. Ankaŭ en tiu interparolo li esprimis sian deziron helpi al la Ligo, sed li ne akceptis fariĝi membro de la prezidantaro de KEL. Li nur petis, ke ni liveru al li skriban planon por la estonta evoluo kun mencio de la ĉefaj problemoj, kiuj nin turmentas. Nur kelkajn tagojn pli poste li venis al la libroprezento "Moderna kroata poezio" en Esperanto, kie anstataŭ la planitaj 15 minutoj li restis preskaŭ du horojn. La tiama sekretario de KEL (**Bečić**) ne preparis la petitan materialon dum pli ol unu monato kaj tial ni en IKS preparis la petitan materialon kaj sendis ĝin al **Nikola Šegota**. Kelkajn tagojn pli poste li anoncis sian viziton al niaj ejoj. En la interparolo pri problemoj, deziroj kaj planoj ni prezentis al li la deziron, ke oni petu pri speciala ekspres-loterio, kies profito irus al KEL pro la preparoj de la 100-jariĝo de Esperanto. Fine de januaro 1982 okazis internacia simpozio pri ŝparoj, kiuj estus atingeblaj en internaciaj kontaktoj per uzo de Esperanto, en kiu partoprenis ankaŭ la tiama vicprezidanto de UEA d-ro **Renato Corsetti**. Lin la Respublika Komitato de Socialisma Unuiĝo invitis al vespermanĝo. Ĉeestis **Marinko Grujić**, direktoro de Vjesnik, **Damir Sinković** kaj nome de la parlamento **Nikola Šegota**. Ŝajnas, ke la interparalo dum tiu vespero influis al lia posta definitiva decido akcepti kandidatiĝi kiel prezidanto de KEL.

Kelkajn tagojn pli poste li invitis nin al interparolo en Sekretariato por Financoj de Kroatio, en kiu ni diskutis pri peto rilate la loterion. Ĉeestis ĉefo de la Sekretariato, **Nikola Šegota, Josip Brkanac** kaj mi kaj ni transdonis la oficialan peton. Jam en marto la peto estis pozitive akceptita kaj jam tiam oni sciis, ke speciala ekspres-loterio kun reklamo de Esperanto (menciante ĝian 100-jariĝon) estos vendata en la dua duono de la sama jaro kaj ke post ties disvendo fine de la jaro KEL disponos pri mono por la 100-jariĝo. En aprilo **Nikola Šegota** estis dum la jarkunveno elektita nova prezidanto de KEL.

Kvankam la teman kunsidon pri la estonta laboro de KEL en Kunordiga komitato de Socialisma Unuiĝo por sociaj organizaĵoj kaj societoj preparis la pli frua KEL-prezidantaro, por la subteno al tiu laborplano aktive agis **Šegota** dum la kunsido en februaro 1982. Kontaktado kun tiu Komitato estis intensa dum la tuta jaro, ĉar surbaze de la nova Leĝo pri societoj kaj sociaj organizaĵoj tiu ĉi komitato faris decidojn pri tio, kiu ricevos la statuson de socia organizaĵo. Pozitivan opinion pri KEL akceptis la Komitato en la kunveno okazinta la 26-an de novembro 1982 post multaj klopodoj de **Nikola Šegota**, ĉar la prezidantino de la Komitato **Štefa Špiljak** kontraŭis tion kaj la decido en la antaŭa kunveno estis prokrastita. Samjare Šegota startigis plurajn aliajn iniciatojn, inter kiuj estis ankaŭ diskuto pri la laborplano de KEL en Kulturkomisiono de respublikaj sindikatoj. Post lia enkonduka parolo oni tie akceptis tre pozitivanjn konkludojn. Tio estis komenco de posta abunda kunlaboro kun la sindikato, ĉefe kun la sindikata gazeto "**Radničke novine**". Dum tiu tuta tempo **Nikola Šegota** ne nur aktive gvidis KELon, havis multajn diversajn kontaktojn, sed ankaŭ vizitis plurajn Esperanto-societojn ekster Zagrebo. Li kontaktis esperantistojn de Split, partoprenis en seminario por junaj aktivuloj de KEL proksime de **Bjelovar**, veturis al **Rijeka** por viziti vilaon Amforon, la postan Esperanto Domon. Li iniciatis ankaŭ kunsidon en la Universitata Biblioteko por interparoli pri la heredaĵo de **Marinko Gjivoje**.

Kvankam emeritigita en majo 1982, **Šegota** restis tre aktiva en multnombraj soci-politikaj organizaĵoj kaj organoj interalie ankaŭ kiel prezidanto de Asembleo de Loterio. Li estis tre engaĝita en la preparoj de nova Leĝo pri loterio kaj hazardludoj, kiu estis definitive akceptita en 1983. En ĝi troviĝis ebleco, ke ankaŭ KEL fariĝu konstanta utiliganto de la mono el la profitoj de la Loterio, kio antaŭe ne estis ebla. Nikola Šegota sukcesis enmeti en la leĝon paragrafon pri financado, kiu antaŭe ampleksis nur sportajn kaj humanismajn organizojn, ankaŭ sociajn junularajn organizojn, laŭ lia ĉiam ekzistanta kompreno, ke necesas maksimume helpi la junularon. Pri tiu grupo de monutiligantoj (junularaj soci-gravaj organizoj) la kunordigadon pri financado faros Kunordiga komitato de sociaj organizaĵoj, membroj de Junulara Asocio de Kroatio, en kiu membris interalie ankaŭ KEL. La Leĝo enhavis ankoraŭ unu novajon. Laŭ la antaŭa leĝo oni financis nur tutrespublikajn organizojn, laŭ la nova 70% de la planita mono iris al lokaj societoj rekte kaj 30% al la respublikaj, tiel estis malfermita la ebleco ricevi konstantan monon el tiu fonto ankaŭ flanke de lokaj Esperanto-grupoj.

Komence de 1983 **Šegota** kontaktis la prezidantinon de la tiama plej amasa soci-politika organizaĵo: Socialisma Unuiĝo, **Darinka Puškarić**, kiu akceptis la delegitaron de KEL gvidatan de **Šegota** en februaro 1983. Ankaŭ ĉi tie oni subtenis la laboron de KEL kaj la planon tre solene celebri la 100-jariĝon de Esperanto. Oni decidis peti akcepton ĉe la Jugoslavia prezidanto de Socialisma Unuiĝo. La delegacion de Jugoslavia E-Ligo akceptis la prezidanto **Marin Cetinić** en **Beograd** la 21-an de aprilo 1983. Nome de KEL ĉeestis **Šegota** kaj mi. Dum tiu ĉi kunveno oni ricevis gravajn informojn por la estontaj paŝoj kaj la rajton delegi sian delegiton en Federacian konferencon de tiu organizaĵo. Tiu delegito poste fariĝis **Nikola Šegota** por la periodo 83-87. Je iniciato de **Šegota** okazis ankaŭ kelkaj kunvenoj en Eduka konsilio de Kroatio, pro kio tiu ĉi institucio en februaro 1983 subtenis la peton de KEL enkonduki Esperanton kiel liberan aktivecon en elementajn kaj mezajn lernejojn de Kroatio. En marto samjare startis la rubriko "Esperanto" en "**Radničke novine**" je duona paĝo, kiun redaktis **Judita Rey** dum plenaj du jaroj. Dum la jarkunveno de KEL en aprilo 1983 en **Karlovac Šegota** estis reelektita la duan fojon por esti prezidanto. La nova loteria leĝo ebligis al KEL ricevi jam en 1983 financajn rimedojn de 3.000.000 da dinaroj kaj oni iniciatis la rekonstruadon de malnova kastelo **Lukavec**, kiu laŭplane estus devinta fariĝi internacia junulara Esperanto-centro. Dum la jaro 1983 realiĝis signifa salto ankaŭ je la plano de instrumetodoj de Esperanto. IKS realigis grandan eksperimenton de rapida lernado de Esperanto dum unu semajnfino por 300 volontuloj. Tio ebligis novan evolulinion de la Zagreba instrumetodo kaj pli rapidan edukadon de E-instruistoj. La mono ricevita en tiu jaro estis grandparte investita por tiu eksperimento, por adapto de la nova lernolibro kaj seminarioj por novaj instruistoj de Esperanto en Zagrebo kaj ties ĉirkaŭaĵo. La Zagreba instrumetodo rapidege ekdisvastiĝis. Oni realigis kontaktojn kun Aŭstrio, Hungario kaj Italio, kiuj same aperigis lernolibrojn laŭ la Zagreba Metodo. La svisa verkisto **Claude Piron** verkis scenaron de speciala bildstrio por la metodo kaj poemojn.

Sed en 1983 oni malkovris nekuraceblan malsanon de Nikola Šegota (kancero). Kvankam li sentis, ke io ne estas en ordo, li ne iris al kuracisto antaŭ grava kunveno de la Asembleo de Loterio kaj hazardludoj en junio 1983, post kio li devis iri al la hospitalo. Malgraŭ la malsano (alternis periodoj de hospitala kaj hejma kuracado) li daŭre aktivadis. Dum tiu tempo li lernis Esperanton, kunlaboris en la rubriko Esperanto de "**Radničke novine**", kie li eĉ publikigis tradukon de iu artikolo el la ĉina revuo "**El Popola Ĉinio**", li skribis artikolojn por "Tempo" kaj aliajn.

En 1984 li forte engaĝiĝis je la realigo de la planoj de KEL. Ekde la jarkunveno okazinta en **Kutina** en aprilo 1984 li ne plu estis prezidanto (tiutempe validis la statuto, laŭ kiu neniu povis esti elektita pli ol 2 foje por la funkcio de prezidanto) kaj li estis elektita prezidanto de la Komitato por preparo de 100-jariĝo de Esperanto. Tiusence li kontaktis televidon Zagreb (kunsido kun direktoro) kaj kun la preparkomitato de la **Zagreba Universiado** (kunsido kun **Drago Flego**). Jam tre malsana li venis al kunsidoj de la prezidantaro de KEL kaj al la kunsido de la Komitato por centjariĝo de Esperanto. Tiujare IKS iniciatis ankaŭ la starton de revuo "**Ovo**", amuza kaj sprita revuo en simpla Esperanto. En momentoj de duboj kaj dilemoj Šegota plene subtenis la iniciaton, ĉar li kredis je kapablo de junaj homoj kaj ilia entuziasmo. Kaj la revuo naskiĝis. Li plene subtenis la klopodojn de KEL en tiu jaro por realigi la unuan parton de la

plano pri fondo de **Internacia Junulara E-centro** en **Lukavec** kaj fine de tiu jaro oni aprobis la unuajn financajn rimedojn por tiu celo (1.800.000 dinaroj por ellabori projektan dokumentaron). Jam en tre malbona stato en junio 1984 li decidis persone iri al la kastelo por vidi ties staton kaj post tio li estis ankoraŭ pli konvinkita, ke indas agadi por tiu celo. La kastelo estis en malbona stato kaj necesis multaj klopodoj kaj mono por rekonstrui kaj funkciigi ĝin (kio bedaŭrinde poste ne realiĝis). Baldaŭ poste li subtenis la kroatiajn esperantistojn inviti Internacian Junularan Kongreson en Zagrebo. "Necesas fari ĉion, por ke tiu kandidatiĝo sukcesu kaj ke oni vere ricevu la kongreson" estas liaj vortoj dum la kunveno de la Komitato por la 100-jariĝo de Esperanto.

Apartan zorgon **Nikola Šegota** dediĉadis al la institucio **Internacia Kultura Servo**, kies direktoro mi estis, kiu kiel serventrepreno de KEL ĉiam rapide kaj efike plenumis ĉiun taskon de li ricevitan. Li helpis por ricevi ejojn en Velika Gorica kaj venis persone rigardi ties konstruadon. Ofte li substrekadis, ke IKS estas juna kaj tre elanplena kolektivo kapabla realigi grandajn taskojn.

Li subtenis ankaŭ **Esperanto-societon** en **Rijeka** solvi la malfacilaĵojn rilate la lastajn elpagojn por la aĉetita vilao **Amfora** kaj aprobis prunton el la mono, kiun KEL ricevis de la Loterio.

La lastan personan kontakton kun li mi havis kelkajn tagojn antaŭ la nova jaro en decembro 1984. Kvankam jam tute elĉerpita, li interparolis kun mi en sia loĝejo preskaŭ du horojn. Li parolis pri planoj kaj donis utilajn konsilojn. Lia baza mesaĝo dum tiu lasta renkonto estis: "Restu je la sama direkto de via evoluo, je kiu vi estis ĝis nun. Ne estas necese enkonduki funkcion de profesia sekretario de KEL. IKS devas ankaŭ plue esti motoro kaj realiganto de la planoj de KEL. Daŭrigu realigadi la iniciatojn kiaj **Lukavec** kaj **"Ovo"**.

En la tago de lia morto la 31-an de januaro 1985 okazis kunsido de Komisiono por sociaj organizaĵoj kaj societoj ĉe la Junulara Asocio de Kroatio dediĉita al financado en 1985-a jaro. Tie mi aŭdis, ke dum la kunsido de la Prezidantaro de Loterio kaj hazardludoj antaŭ kelkaj tagoj oni traktis ankoraŭ tri skribajn proponojn de Nikola Šegota. Foririnte en hospitalon, el kiu li ne plu revenis, li kunportis aktujon kun amaso da dokumentoj por povi labori "kiam iom malplifortiĝos la doloroj".

Laborante ĝis la lasta tago de sia vivo **Šegota** lasis neforviŝeblan spuron en la historio de kroatia Esperanto-movado kaj pli larĝe, ĉar la internaciaj iniciatoj kiel revuo **Ovo**, manifestaĵo **"100 jaroj de Esperanto-kulturo 1987"** kaj **IJK en 1988 en Zagrebo**, kontaktoj kun **Ĉina Esperanto-Ligo** restos gravaj ankaŭ en la internacia Esperanto-historio.

La agado de **Šegota** ebligis abundan regulan financadon de KEL kaj IKS ĝis la milita jaro 1991, kio kaŭzis, ke speciale la junulara E-movado en Kroatio daŭre fortiĝadis kaj same pluraj iniciatoj de IKS inkluzive de PIF. Pinto de tiu periodo estis la jaroj 1987 kaj 1988 kiam en zagrebo okazis manifestaĵoj "100 jaroj de E-kulturo" kaj Internacia Junulara Kongreso. En tiuj jaroj ĉiumonate okazis novaj E-kursoj, la ĝeneralaj publikrimedoj disponigis neimageble multan spacon al Esperanto (dum du jaroj la ĉefa tagĵurnalo Večernji list havis semajnan rubrikon "Esperanto", dum la IJK tri zagrebaj ŝtataj radio-stacioj havis ĉiutagajn rubrikojn pri Esperanto kaj la kongreso), televido daŭre elsendis raportaĵojn pri Esperanto kaj la pinta aranĝo estis la plej populara tiutempa elsendo de kvizo kies unu elsendo estis dediĉita al Esperanto. Tial Zagrebo ankoraŭ nuntempe estas la urbo, kiu havas la plej grandan kvanton da gejunuloj kun bona scio de Esperanto kaj aktiva agado en la tutmonda E-movado.

La agado de **Šegota** estas efektive la nura ekzemplo en la E-historio, kiel devas procedi politikisto, se li volas verajn penetrojn de Esperanto en socio. Studi liajn agpaĵojn povas esti ege utila por sugesti al politikistoj kiuj sincere volus fari ion por Esperanto, kiel agi.

Z. Tišljar

DENOVE KRIŽEVCI: MALGRANDA URBO POR GRANDA LINGVO

Ankaŭ ĉi-somere, ekde la 18-a ĝis 29-a julio kaj ekde la 8-a ĝis 19-a aŭgusto, malgranda urbo Križevci iĝis granda Esperanto-urbo. Dank' al Biblioteko Križevci, kiu denove montris grandan intereson kaj subtenon, ĉirkaŭ 25 novaj homoj en du apartaj grupetoj eklernis la internacian lingvon Esperanto. Sed, malsame al la lastjaraj laborejoj, kiuj daŭris nur po unu semajno, tiuj nun okazis, kiel mi lastjare promesis, en la daŭro de du semajnoj kaj estis en multaj facetoj pli intensivaj, precizaj kaj informriĉaj.

Krom la intensa baza kurso de Esperanto, kiu denove baziĝis sur la konataj lecionoj de la **Zagreba Metodo**, la laborejo ankaŭ konsistis el la diversaj prelegetoj pri aliaj planlingvoj, kaj kompreneble pri la turbulema historio, la abunda kulturo kaj la vere interesa muziko de Esperanto. Ĉar la nomo de la ĉi-jara laborejo estis **Esperanto kaj lingva egalrajteco**, en la laborejo krome temis pri la hodiaŭa stato de diversaj ligvoj en la mondo kaj Eŭropa Unio kaj ankaŭ pri la kajkava dialekto kaj lokaj kajkavaj idiomoj en Kroatio. Nome, mi emfazis ke, kompare kun la angla kaj aliaj 'mondaj' lingvoj, nur Esperanto povas verŝajne efektive starigi veran lingvan ekvilibron kaj helpi al la konservado de aliaj lingvoj, dialektoj kaj idiomoj. Mi estis suprizita pro la intereso, kiun la partoprenantoj montris, koncerne facilan, flekseblan kaj neŭtralan Esperanton kaj variajn lingvajn demandojn (eko-, inter- kaj socio-lingvistikajn). Fascinitaj kun la laborejo kaj la lingvo mem la partoprenantoj esprimis intereson por sekvontjaraj progresantaj kursoj kaj ankaŭ por eblaj ekskursoj kaj renkontiĝoj en estonteco.

La solena disdono de kurso-diplomoj okazos ĉe la fino de septembro. Espereble, per la grandega kaj grandanima helpo de **Biblioteko Križevci**, la laborejo reokazos ankaŭ venontjare.

Krunoslav Puškar



Fotis Krunoslav Puškar

REFONDITA ESPERANTO-SOCIETO EN BJELOVAR

La 25an de aŭgusto 2011 en la dolĉaĵejo Zagorje en **Bjelovar** okazis kunsido de la 11-kapa iniciata komitato pri refondo de **Bjelovara esperantista societo**. La fondkunveno okazis la 10an de septembro 2011 en la ejoj de **Češka obec** kaj ĉeestis 27 personoj. La societo renaskiĝis post la tre sukcese organizita 9a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar en majo 2011. La estraro de la societo konsistas el: **Franjo Forjan** (prezidanto), **Grozdana Grubišić-Popović** (sekretariino), **Ljerka Stilinović** (kasistino), **Nenad Margetić** kaj **Berislav Rubčić** (memdbroj de administra komitato), **Zdenka Polašek** (prezidantinoo ne kontrola komitato), **Vinko Grgurev** kaj **Željko Saks** (membroj de kontrola komitato).

J. P.

96a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN KOPENHAGO

De la 23a ĝis la 30a de julio ĉi-jare 1457 oficiale aliĝintaj kongresanoj (kiel informis la antaŭlasta numero de la kongresa kuriero) **Vikinga Voĉo**). La **96a Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago** okazis en la moderna arkitekture interesa kongresejo **Bella Center**, konsistanta el kongresa centro kaj la hotelo en formo de modernaj kliniĝintaj turoj kiajn ni ankoraŭ ne spertis. La prezidanto de Loka Kongresa Komitato **Ileana Schrøder** kaj ŝia afabla kaj ne tro multnombra teamo faris por ni tre sukcesan kongreson, kiu facile glitis tra la kongresa semajno. (Ileana renkontis Esperanton en Rijeka kaj ni danku ĉi tie ŝian Esperanto-instruiston, kiu siatempe ne fortimigis ŝin de la fenomeno Esperanto.)

Višnja Branković, Bojana Đuričić, Gordana Katunar, Zlata Nanić, Katja Osibov, Ivo Osibov, Spomenka Štimec, Maja Tišljar, Zlatko Tišljar kaj **Mirjana Žeželj** estis la esperantistoj el **Kroatio**, kiuj kongresis en **Kopenhago** pri la temo **Dialogo kaj interkompreno.** Je la flanko de kongresaj helpantoj aldone laboris kopenhaga esperantistino devena de la insulo **Mljet Ana Ćumbelić-Røssum**.

Estis agrable sperti ke la kongreso sukcesis havigi atenton de Ĝenerala direktoro de **UNESCO Irina Bokova**, kiu adresis al la kongreso en la nuna **Jaro de la junularo** de **UN** sian bondezirigan mesaĝon. Malmultaj el niaj kongresaj organizantoj kapablas havigi tian subtenon tra la malsimplaj administraj vojoj de UN kaj UNESCO. Ankaŭ kiam ni organizis la zagreban Universalan Kongreson, ni pri tiu punkto ne sukcesis. La kroata ambasadejo en Kopenhago bedaŭrinde ne sendis sian reprezentanton al la malfermo, kiel KEL petis, des pli agrable estis ke ministro-konsilanto **Krešimir Kedmenec**, dejoranta en la kroata ambasadejo, invitis kvarmembran delegacion al la kroata ambasadejo por informiĝi pri Esperanto.

En Kopenhago kroataj esperantistoj havas specialan historian lokon – la tombon de **D-ro Ivo Lapenna**. Vizito al ĝi okazu iun alian fojon.

Kion ni faris en Kopenhago? Jen **Zlata Nanić** mem raportas pri sia ILEI-konferenco en antaŭkongresa semajno. Dum **Maja** kaj **Zlatko Tišljar** aktivis pri **Eŭropa Esperanto-Unio** kaj ties venontjara kongreso en **Irlando**, samkiel pri la venontjara jubileo de la centa datreveno de naskiĝo de **Tibor Sekelj**, **Spomenka Štimec** komitatkunsidis kaj gvidis kunsidon de **Akademio Literatura de Esperanto**, en kiu ŝi kun **Probal Dasgupta** prezentis la EU-projekton pri unu hindunia infanlibro en Eŭropo – tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio, financata de Eŭropa Unio. La raporto pri la laboro aperis libroforme en **Kopenhago** kadre de la volumo pri Esperantologia konferenco en Havano 2010 sub la titolo **Esperantologio, Kajero 5 de la jaro 2011**.



La prezidanto de UEA D-ro Probal Dasgupta renkontiĝis kun skulptisto Jesper Neergaard.
Fotis Kikushima Kazuko

Josip Pleadin gajnis en la kopenhaga kongreso **Subvencion Cigno** por **Dokumenta Esperanto-Centro** en **Đurdevac**!

Se mi el riĉa kongresa menuo devus elekti nur kelkajn erojn kiuj aparte stimulis, jen ili:

La groenlanda koruso prezentinta dum la nacia vespero en la ĉarmoplena parko **Tivoli-koncertejo**. Tie ni havis la okazon vidi intersan kontribuon de ŝia **Reĝina Moŝto Margareto la Dua** al la baledo de **Pantomima Teatro de Tivoli**, por kiu ŝi desegnis kostumojn. (Ne nur kroata Prezidento **Ivo Josipović** estas artisto.)

Aparte impresis la ĉeesto de **Felicja Raszkin-Nowak**, pola sinjorino kiu fuĝis el la getto de **Bjalistoko** ĉe la lanĉo de ŝia libro **Mia stelo**, en traduko de **Tomasz Chmielik** kaj la Esperantlingva filmo de la pola **TV Poto da oro** pri ŝia vivo, prezentita dum la sesio de la Literatura Akademio.


La amika vizito al la artisma hejmo de skulptisto **Jesper Nergaard** kaj lia edzino **Lilian** dum la nekutima merkreda ekskurso.Lia skulptajo **La Futuro** staras en Zagrebo post 2001. Dum la kongreso ni veturis tra la dana kamparo apud la dolmenoj al la artoplena hejmo de la skulptisto, en ĉarma akompano de geamikoj ...

La dokumenta filmo de **Sam Green** pri la **Universala Lingvo**. Estas bone vidi ke aliaj okupiĝas pri ni, profesie kaj sen malico.

La konata kanto **Sola** de **Kim Henrikssen**, en la adiaŭa kongresa vespero, kun ĉiuj artistoj kantantaj kun li surpodie, antaŭ ol la kongresanoj disiĝis al sesdeko da landoj ...

Hanojo en **Vjetnamio** jam hisas sian kongresan flagon por la jaro 2012. En **Kopenhago** videblis la vjetnama kongresa afiŝo, en kiu vjetnama pupo, movata per aktoro, staranta en la akvo ĝis la brusto, donas al la pupo la vivon.


S. Štimec


ESPERANTOLOGIO

ESPERANTO STUDIES

E.E.P.

Kajero 5 2011 Issue No. 5



La kongresejo Bella Center.
Fotis Spomenka Štimec

MIA AMIKO VIKTOR NOGIN

Eble niaj legantoj legis en la kroataj gazetoj **Jutarnji list** (la 6an de februaro 2011) kaj **Večernji list** (la 13an de februaro) pri du rusaj ĵurnalistoj mortigitaj dum la milito en la vilaĝo **Panjani** apud **Hrvatska Kostajnica** en la jaro 1991. Legeblis en tiuj gazetoj ke dum 20 jaroj oni klopodas solvi la problemon pri tio kiu pafis kaj kiu mortigis la ĉefan korespondanton de la sovjeta radio-televido el Belgrado kaj lian fotiston.

Mi amikis al tiu ĵurnalisto kaj mi estis gasto en lia moskva hejmo. Mi dividis mian scion pri li kun la membroj de **Esperanto-Societo Bude Borjan** en mia prelego, kiun mi resumas por **Tempo**.

La mortpafita rusa ĵurnalisto nomiĝis **Viktor Nogin**. Li studis en la **Filozofia fakultato** de **Zagrebo** en la jaro 1965. Li loĝis en Studenta hejmo **Šarengradska**, kie ankaŭ mi vivis. Mi lernis en la mezlernejo la rusan lingvon kaj mi deziris paroli kaj aŭdi kaj pli bone lerni la rusan lingvon, kiun mi studis. **Viktor Nogin** donis abundan okazon por lingva ekzerco. En la jaro 1969, kiam mi finis miajn studojn, pluraj studentoj de la rusa lingvo veturis kun **Viktor** al **Moskvo**. **Viktor** gastigis min en sia hejmo. Lia patro **Vladimir** estis invalido al kiu mankis gambo perdita en la Dua mondmilito. La patrino de **Vladimir** kaj la avino de **Viktor**, kiu akceptis min, estis la edzino de la konata **Viktor Nogin**, proksima kunlaboranto de **V. I. Lenin**. La avo de Viktor naskiĝis en 1878 kaj kiel dudekjarulo renkontis **Lenin**, ricevinte lian unuan leteron. Li studis **La Kapitalon** de **Karl Marx** kaj politke engaĝiĝis. En 1906 li organizis strikon por 30.000 laboristoj en 18 teksaĵfabrikoj. Li vojaĝis en diversaj landoj de la okcidenta Eŭropo kaj vizitis Usonon. Ofte li estis arestita. La avo mortis kiel 46-jarulo en 1924. Oni entombigis lin apud la **Ruĝa Placo** urbocentre en **Moskvo**. Pluraj stratoj en la lando estis nomumitaj laŭ lia nomo, pluraj urboj de la lando ricevis la statuton de **Viktor Nogin** kiel ornamaĵon. La urbo **Bogorodsk** ricevis nomon **Noginsk**.

Viktor prezentis min al sia avino **Olga Nogina**. Tio estis por mi aparta sperto: la maljuna sinjorino 84-jara vivis en prestiĝa grandega loĝejo apud la **Ruĝa Placo** en **Moskvo**. Kiam ni eniris, ŝi per gramofono aŭskultis romanon de **Maksim Gorkij**, la verkisto kiun ŝi junaĝe konis.


Nur tiam mi komprenis el kiel speciala familio venas mia kunstudento **Viktor**. La avino donacis al mi libron pri la familio **Nogin**, kun ŝia dediĉo. Mi foliumis en ĝi kaj mi komprenas:

Lia avo **Viktor Nogin** mortis 46-jara.

Lia nepo, la ĵurnalisto **Viktor Nogin** estis mortpafita 46-jara.

Kvardek ses jarojn post lia unua vizito al Zagrebo studcele oni starigas monumenton al **Viktor Nogin** en **Panjani** kaj oni klopodas trovi la restaĵojn de lia korpo kaj liajn murdintojn. Mi konkludas ke 46 estis sortoporta cifero en la familio de **Nogin**, en kies moskva hejmo mi gastis.

La titolpaĝo de la libro pri Viktor Nogin, la avo de pereinta ĵurnalisto Viktor Nogin.



Slobodan Kukić

RUĐER JOSIP BOŠKOVIĆ 300 JAROJ INTER NI

Sub la alta protektado de kroatiaj politikaj altranguloj: **Ivo Josipović**, prezidento de Respubliko Kroatio; **Luka Bebić**, prezidanto de parlamento kaj **Jadranka Kosor**, premierino - la 17-an de majo 2011 en la Koncertejo de Vatroslav Lisinski en Zagrebo okazis solena festo de 300-jariĝo de **Ruđer Bošković** unu el la plej grandaj kroatiaj sciencistoj ĉiutempe. Estis li filozofo, matematikisto, fizikisto, astronomo, diplomato, poeto. La solenaĵon partoprenis ĉirkaŭ mil eminentuloj de la zagreba respektive kroatia kultura kaj publika vivoj. Inter ili ankaŭ reprezentantoj de la esperantistaro kroatia: **Judita Rey Hudeček**, prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo kaj Anto Mlinar, prezidanto de **Esperanto-societo "Bude Borjan"**.

Kiu kaj kia entute estis tiu homo kies verkojn kaj profetaĵojn oni eĉ post tiom longa tempo analizas, esploras kaj daŭrigas?! Provu ni almenaŭ kelklinie respondi ĉi-tiun demandon, aparte por la monda esperantistaro kiu malmulte aŭ nenion scias pri li.

Li naskiĝis la 18-an de majo 1711 en **Dubrovnik** kie li travivis sian infanaĝon kaj jam 14-jara li daŭrigis sian klerigadon en Romo kie li studis filozofion, matematikon, fizikon kaj astronomion. Baldaŭ Rude (kiel karesnome lin nomis liaj konatoj) komencis sian sciencan verkadon. Li verkis multajn traktatojn, kunlaboris en diversaj sciencaj revuoj tiutempaj kaj korespondis kun ĉiuj grandaj sciencistoj de tiu epoko. Tiuj leteroj ofte fariĝis la sciencaj traktatoj kaj per tio li akiris tiom grandan renomon ke li fariĝis membro de ĉiuj ĉefaj akademioj kaj sciencaj societoj de Eŭropo.

Ĉar ni ĉi-foje ne disponas pri sufiĉe da spaco por pli amplekse prezenti liajn biografiaĵojn, estas grave almenaŭ mencii lian la plej gravan verkon: **La teorio de la natura filozofio**, la verkon kiu eĉ hodiaŭ estas la objekto de trastudado por multaj sciencistoj kiuj pere de tiu teorio klopodas progresigi nuntempan sciencon.

Ruđer Bošković mortis la 13-an de februaro 1787 en **Milano** kaj tie estas entombigita. Dum sia vivo kiu daŭris preskaŭ 76 jaroj kaj kvindek jaroj de fortostreĉa kaj fruktodona scienca laboro li fariĝis la plej granda sciencisto tiutempa kaj liaj verkoj fariĝis firma bazo kiel por pripensado de estontaj sciencistoj tiel ankaŭ por progresigo de la scienco entute. Hodiaŭ lian nomon portas unu kratero sur la Luno kaj Instituto por sciencaj esploroj surkampe de atomfiziko, kiun oni fondis en la jaro 1950 en Zagrebo.

Anto Mlinar

BLINDAJ ESPERANTISTOJ KONGRESIS EN OLOMOUC

De la 14a ĝis la 21a de julio okazis en **Olomouc** en **Ĉeĥio** la **77a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**. Blindaj esperantistoj el 12 landoj partoprenis en **Olomouc**. El **Kroatio** partoprenis la trimembra **familio Štoković, Franko Bakša** kaj **Antun Kovač** kun la akompananto **Vladimir Dujnić**. La temo de la kongreso estis **Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj**. Dum la kongreso **Antun Kovač** kontribuis al la kongresa temo per prelego pri la **Muzeo de la urbo Zagrebo kaj ties alireblo por blinduloj.**

Ĉu la venonta kongreso de blindaj esperantistoj okazos en Finnlando, Italio aŭ aliloke, ankoraŭ ne estas klare.

Antun Kovač



Vladimir Dujnić kaj Antun Kovač tostis en la kongreso de Olomouc.

Fotis Kikushima Kazuko

SAT-KONGRESO EN SARAJEVO

Sarajevo gastigis la **84an SAT-kongreson** de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 2011. Sepdeko da partoprenintoj en **Hotel Terme** en **Ilidža** ĝuis la kongresan semajnon en la urbo, kiu interalie per pacaj aranĝoj sanigas siajn neforvišeblajn militajn vundojn.
(La urbo konsideras kandidatiĝon por la kultura ĉefurbo de Eŭropo en 2014, la jaro kiam la urbo atingos la centan jubileon ekde la pafo de **Gavrilo Princip**, kiu signis la komenciĝon de la Unua mondmilito kaj metis **Sarajevon** en la sangan mondan historion. Se **Sarajevo** fariĝos Eŭropa ĉefurbo en 2014, ĉu **Universala Kongreso de Esperanto** gastos tiujare en **Sarajevo**?)

La partoprenintoj de SAT-kongreso ĝuis la gastamon de bonaj gastigantoj, traktine diversajn temojn laŭ la abunda tagordaro de diligentaj SAT-anoj, trovante en la kongresa parto la lokon por la ekskursoj (ekz. al la Piramidoj de **Visoko**, al **Mostar**, al la kortuŝa memorloko **Srebrenica**) ... La kongresan organizadon prizorgis **Senad Čolić, Fetah Zvirac, Kemal Jakupović, Azra Čolić, Ivica Horvat** dum pri sia fako prelegis **Samir Ribić**.

Loka Kongresa Komitato gvidis la kongresajn aktivecojn el la ejoj de sia nova adreso **Kralja Tvrtka 19**, per kiu la gratulinda bosnia Movado envicigis **Sarajevon** al la malmultaj lokoj en la mondo, kie ekzistas la Esperanta ejo, posedata de esperantista asocio.

El **Kroatio** partoprenis **Dinko Matković** kaj **Spomenka Štimec**, ambaŭ kontribuinte al la kultura programo de la kongreso. **S. Štimec** estis la gasto de la kongreso dum la ekskurso al **Mostar**, kie en la ombro ĉe la rivero **Buna** en **Blagaj** estis prezentita libro **Hodler en Mostar.**

Dinko Matković ne bedaŭris veni de sia insulo **Hvar** por aŭdigi siajn sagajn aforismojn., el lia aforismaro **333 cerbaj impulsoj** eldonitaj de **Izvori**.

La gastigantoj profitis la kongresan okazon por prezenti al la kongresanoj la volumon de prelegoj de la oktobra festo de centjariĝo de la Movado en **Bosnio kaj Hercegovino**, prifestita per la impona Ronda Tablo. La libro estas ricevebla en nia biblioteko en **Knez Mislav**.

Estas interese scii kio en la urbo **Sarajevo** kulture gravas por nia tuta Esperanta Movado. En artgalerio **Umjetnička galerija** en la strato Zelenih beretki oni gardas desegnajn verkojn de **Hector Hodler**, kadre de la impona kolekto de lia patro **Ferdinand Hodler**. La kolekto **Hodler** ne estas alirebla por la publiko, aktuale oni ekspoziicias nur kvar verkojn de **Ferdinand Hodler**. Pri unu el la ekspoziciataj verkoj eblas aĉeti la bildkarton de la pejzaĝo de **Ferdinand Hodler**, kiun la galerio eldonis okaze de la **Vintraj Olimpikaj Ludoj 1984**. Ni petis la **Galerion** prezenti la verkon en iu el la venontaj numeroj de Tempo, kaj se la permeso venos, vi vidos ĝin.

S. Štimec

SUBVENCIO CIGNO AL DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO

En la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, **Dokumenta Esperanto-Centro** el **Đurđevac** estis proklamita unu el la tri ricevintoj de ĉi-jara **Subvencio Cigno**, kiun **Universala Esperanto-Asocio** atribuis al ĝi por plibonigo de ĝiaj materiaj kondiĉoj kaj pligrandigo de ĝiaj kolektoj. La subvencion estis starigita per donaco de japana esperantista mecenato **Etsuo Miyoshi**.



La IJK en Ukrainio vidita de la kroata partopreninto Krešimir Jerić

BOSNIO

Bosnio, tiu estas bona lando:
kiam Ŝi ploras, seltersaj fontoj bobelas

En Bosnio ekzistas certa silento
en la silento certa kampo
en la kampo la floriĝinta arbo

Bosnio dumvintre tra l' tuta nokto arĝente sonoras;

Bosnio havas la bosnianon
kiam la bosniano kuŝiĝas ripozi
li tre lante la kapon al-terigas
por la teron ne lezi

Bosnio havas la patrinon
la patrino suriras monton super la fervojo
kaj mansvingas al maŝinisto

La patrino mansvingas al maŝinisto
kaj la lokomotivo ĝojkrias

Bosnio havas la domon
en la domo loĝas la matrono
ŝia rideto estas ajeto* pri l' paradizo

Senŝuigu vin transirante la riverojn
Korana, Glina
Sava kaj Drina
lavu la piedojn en ties akvoj

Nedžad Ibrišimović
Esperantigis: Branko Miljko

* frazo aŭ fragmento el La Korano

Publikigita kun permeso de "Bosnia Lilio" 1/1999

VERDAJ FAJREROJ

Tra la mondo iras forta voko, sed ĝi laciĝas – la mondo estas vasta.

SAT-anoj kutimiĝu al la eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo – vi aĉetu SAT-elitan tv-antenon!

Esperantistoj malkonstruas la murojn de miljaroj – ŝtonon post ŝtono.

Dinko Matković

TINA TIŠLJAR – KROATA ESTRARANO DE TEJO

Tina Tišljar laboris lastsomere kiel helpanto en **Internacia Infan-Junula Kongreseto** en **Hundested** en **Danlando**. La Kongreseto kaj **Renkontiĝo de esperantlingvaj familioj** estas la aranĝoj en kiuj ŝi infanaĝe ekster sia esperantlingva familio edukiĝis per Esperanto. Ŝi estis elektita por la estrarano pri kongresoj de la nova **TEJO-estraro**, kiu en **Ukrainio** bedaŭrinde kongresis sen ŝi.

S. Štimec

RAPORTO PRI MIRO 2011: VERDA RENKONTIĜO PLENA DA MIRINDAĴOJ

La ĉi-jara, **12-a MIRO (Mirinda Internacia Renkontiĝo)** okazis de la 1a ĝis la 6a de aŭgusto en la montara regiono de Kroatio, en la mezepoka kastelo en loketo **Stara Sušica**. Litero M de la akronimo MIRO ĉi-jare staris por Mirinda. Ĉar la kastelo troviĝas en la "verda koro" de **Kroatio**, ĉirkaŭita per montoj, arbaroj, herbejoj kaj riveretoj, la programo de la renkontiĝo baziĝis sur ekskursoj dum kiuj la partoprenantoj mirus al mirindaĵoj de la ĉirkaŭaĵo. Kaj vere, dum la vizito al la kanjono **Kamačnik** en **Vrbovsko**, al la pinto **Javorova kosa** kaj fonto **Božji studenac** en **Stara Sušica**, al la kanjono **Vražji prolaz** kaj akvofalo **Zeleni vir** en **Skrad**, dum la partopreno en la okazaĵo Plodovi gorja, dum la ekskurso kaj naĝado en **Šilo** ... ĉiuj ĝuis la belegan naturon. Krom tio, afablaj virinoj de la asocio **Goranske vunarice** preparis al ni la amuzan kurson pri lanflektado kaj konata ĉasisto de la regiono Johan menciis al ni multe da aferoj pri **Stara Sušica**, kiujn ni ne povas trovi en informiloj aŭ surrete. Je la fino de nia renkontiĝo li dancigis kaj kantigis nin ludante la akordionon. Ni povas konkludi ke al ĉi-jara MIRO ni povas atribui la nomojn de antaŭaj MIROj: ĝi ankaŭ estis mojosa, magiverda, mezsomera, marborda, mezepoka ... :)

Kvankam ni timiĝis ke la renkontiĝo fariĝos kompleta katastrofo, fine ĉio disvolviĝis bonege – dank' al **David Rey Hudeček** la homoj sen aŭto sukcese alvenis al la kastelo. Per sia alveno kaj nombreco agrable surprizis nin Rijekanoj. Necesas mencii ankaŭ nian karan esperantiston **Sebĉjo** kiu disvastigis la informojn pri nia renkontiĝo kaj ĉarmajn **Sophia** kaj **Xavi** kiuj ankaŭ volonte veturigis nin al ĉiuj eksursoj. Ni estas dankemaj al ili kaj ankaŭ al ĉiuj aliaj partoprenantoj ĉar ĉiuj ili ebligis ke ni havis la planitan programon kaj ke MIRO okazis en ĝoja kaj amikema ĉirkaŭaĵo. Estraro de la kastelo kore akceptis nin, spite al nia timo kaj malkomforto pro la nombro de la partoprenantoj. Kuiristinoj ankaŭ estis agrablaj preperante al ni dolĉajn kaj bongustajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn.

KEL, **Liberiga Stelo** kaj **Esperanto Societo Rijeka** ankaŭ helpis al ni pri la efektivigo de MIRO kaj la plej merita por bonaj flankoj de ĉi-jara MIRO estis la ĉefa organizanto de MIRO, prezidanto de KEJA kaj SEK, **Divo Pulitika**, kiu pacience negociis kun la estraro de la kastelo kaj ĉiam zorgis ke ĉiuj fartu agrable dum la renkontiĝo.

Fine al MIRO alvenis 20 homoj. Estas evidente ke la nombro de la homoj pli malgrandas ol la nombro dum antaŭaj jaroj. Kvankam homoj plej ofte diris al ni ke ni devis elekti alian daton ĉar MIRO koliziis kun la slovaka E-renkotiĝo SES, veras ke, se ni elektis kiun ajn semajnon inter la mezo de julio kaj la mezo de aŭgusto, ni kolizius kun iu konata kaj atrakcia renkontiĝo. Laŭ mi, iuj aliaj problemoj estis pli grandaj ol la problemo de dato. MIRO estis organizita de tro malmulte da homoj kiuj konsistigas la novan malspertan estraron de KEJA, sen multe da rilatoj kaj kontaktoj en Esperanta mondo. Bedaŭrinde, multaj aferoj estis faritaj lastmomente kaj neniu povis iri al iu granda E-renkontiĝo por bone promocii MIROn. Do, espereble ventonte pli da homoj partprenos la organizadon de MIRO kaj ankaŭ decidos viziti niajn venontajn mirindaĵojn.

Maja Valentić

La poemo pri la mirinda MIRO

Kiel diri pri MIRO ĉi-jara?
Mirinda, verda kaj arbara!
En Stara Sušica MIRO-ejo estis
Tie ni planis kvin tagojn resti (kaj festi!).
Nia unua problemo kaj la celo
Estis kiel atingi tiun belegan kastelon.
Kiam ni alvenis, Ðivo devis kuraĝiĝi
por konfesi kiom da homoj vere aliĝis.
La pordo de la kastelo por ĉiuj malfermiĝis
Alvenis eĉ homoj kiuj ne aliĝis.
Tamen MIROn partoprenis malmulte da homoj
Ĉiuj povis gustumi multajn kukojn de pomoj.
Ni bone interkonatiĝis, nomŝildojn ne bezonis
La kiuristinoj ĉiam preparis kion ni ordonis.
Neniu prelegis aŭ havis kurson
MIRO estis plena da mirindaj ekskursoj.
Ni vizitis la maron, pinton, fonton, kanjonon
Ni ĝuis la naturon per malmulte da mono.
La naturo belegas, la vetero estis varma
Ĉiu partoprenanto estis kontenta kaj ĉarma.
Ĉiu ekskurso enhavis daŭregan promenadon
Sed la plej lacaj ni iĝis post la lanflektado.
Ni ne renkontis lokajn ursojn en lundo
Mardon ni amikiĝis kun la freneza hundo.
La plej konata ĉasisto de la regiono
Amuzigis nin ludante la akordionon.
Por kelkaj Rijekanoj, la ĉefa demando
Estis kie troviĝas la bona brando.
Kiam venis la tempo por foriro
Ĉiuj konkludis ke bonega estis nia MIRO.

Maja Valentić



Fotis Kaja Farszky

VENDITA LA EJO DE KROATA ESPERANTO-LIGO EN VELIKA GORICA

Kun ĝojo ni informas ke post la 16-jara klopodo pri la ejo en Velika Gorica, troviĝanta en la str. **Cvjetno naselje 14**, ni sukcesis ĝin vendi. La 76m2 ejon ni havigis en 1985, la tempo kiam nia asocio havis subtenon de **Loterio de Kroatio** kaj kiam la financaj rimedoj permesis investi por aĉeti ĝin. Sed **Kroata Esperanto-Ligo** neniam enloĝiĝis en la ejon: kiam ni finpagis la ejon, jam alproksimiĝis la milito. En 1995 kiam KEL volis la ejon ekuzi, tio montriĝis neebla. Necesis forta energio kaj sagaco por ke nia ejo denove havu ĉiujn posedajpaperojn je la nomo de **Kroata Esperanto-Ligo**. Tiun temporaban laboron faris **Spomenka Štimec** kaj **Vjekoslav Morankić**.

La krono de la laboro estis la junia vendo de la ejo. Por la ejo KEL gajnis la kunaan ekvivalenton de 30.400 eŭroj. Per tiu sumo ni pli facile repagados niajn kreditojn pri nia ejo en Vodnikova, por povi, en tempo proksima, enloĝiĝi tie. La novakirita sumo estas parto de nia bazo kapitalo.

Por klarigi la cirkonstancojn kiel eblis ke ni aĉetis la ejon, ni publikigas la artikolon de **Zlatko Tišljar**, Li verkas ĉi-numere pri la homo per kies meritoj ni povis tiun ejon aĉeti, pri **Nikola Šegota.**

S. Š.



Membroj de Esperanto-Societo "Bude Borjan" dum la prelego de Neven Kovačić la 13an de aprilo 2011.
Fotis Danira Grgec

ESPERANTO-SOCIETO "BUDE BORJAN"

La 20an de aprilo 2011 okazis la jarkunveno de **Esperanto-Societo "Bude Borjan"**, gvidita de la prezidanto **Anto Mlinar**. Probable tio estis la plej malfacila jarkunveno en la 66a vivojaro de unu el plej aktivaj Esperantaj kluboj en Kroatio. (Pli frue la 13an de aprilo okazis la lasta prelego en la societo. Prelegis **Neven Kovačić** kadre de sia prelegserio pri sekretaj societoj, li kun granda kompetenteco traktis la temon pri masonoj. La aprila estis la lasta programfolio kiun eldonis la societo.)

Dum la fondkunveno en aŭtuno 1945, la patro de **Lucija Borčić, Ante Borčić** proponis ke la novfondita societo portu la nomon de sia mortpafita membro **Bude Borjan. La Esperanto-Societo "Bude Borjan"** komencis sian vivon en la strato **Neznane junakine** kaj en la dua vivojaro en aprilo 1947 translokiĝis al **Amruševa 5**, "alportinte pianon", kiel notis protokolisto. La ejon disponigis al la Esperanto-Societo advokato **D-ro Mijo Repar**, kunlaborinto de **D-ro Ivo Lapenna**. (Kiam D-ro Repar parolis al mi pri la uzado de lia ejo fare de esperantistoj, li akcentis ke neniam li bedaŭris ke li disponigis tiun ejon al la geamikoj de **Nadica Gropuzzo**, (la tiutempa sekretariino de la klubo.)

D-ro **Repar** dum jaroj restis kunuzanto de la ejoj en **Amruševa 5**, kune kun la familio **Bjelić**, kiun d-ro **Repar** post esperantistoj ankaŭ enhejmigis en sian multĉambran oficejon.

La posedanto de la ejo en kiu aktivis **Esperanto-Societo "Bude Borjan"**, la familio **Delija-Krnić** dum multaj jaroj gvidis la tribunalan proceson kontraŭ **Esperanto-Societo "Bude Borjan"**. La tribunala decido metis punkton al Esperanta vivo en Amruševa 5 kiam la 11an de novembro 2003 la advokato de nia societo **Ranko Tomašević** transdonis la ŝlosilojn al la posedanto de la ejo, observante la trbunalan decidon pri elloĝigo de **Esperanto-Societo "Bude Borjan"** el **Amruševa 5**.

Esperanto-Societo "Bude Borjan" kun siaj aktivecoj forlasis la ejon uzita dum 56 jaroj kaj la Societo daŭrigis sian agadon sub la tegmento de str. **Knez Mislav 11**. La ejon en **Knez Mislav** al **Kroata Esperanto-Ligo** disponigis la urbo Zagrebo. La ejon KEL ricevis luante ĝin. Ĝi estis ricevita en 1999 pro kandidatigo de Zagrebo por organizado de **Universala Kongreso de Esperanto**. De tie ni realigis la tutan organizan laboron de **Universala Esperanto-Kongreso** en 2001. Intertempe la urbo perdis posedrajton je tiu ejo kaj ĝi apartenas nuntempe al la ŝtato, t.e. Ŝtata Agentejo por administrado de ŝtataj posedaĵoj.

Esperanto-Societo "Bude Borjan" agadis de post 2003 en la ejoj de KEL kune kun **Kroata Esperanto-Junulara Asocio** kaj **Studenta Esperanto-Klubo.**

Ĉiuj kiuj iam vizitis la ejon de **Amruševa 5** kaj la ejon de **Knez Mislav 11** scias ke la ejoj ne estas kompareblaj. Esperanto-Societo "Bude Borjan" funkciis per la kotizoj de siaj membroj, ne povante akiri financan subtenon de urbaj instancoj. Premita per diversaj cirkonstancoj, ĝia Prezidantaro proponis al membraro malfondiĝon.

Dum ni eldonas tiun ĉi numeron de Tempo, **Esperanto-Societo "Bude Borjan"** fermis sian ĝirkonton. La dokumentoj pri likvidiĝo estis transdonitaj al la urbaj instancoj por traktado. Ni atendas de la urbo finan dokumenton pri ĉesigo de la agado.

Kutime ĉiuseptembre **Esperanto-Societo "Bude Borjan"** komencis sian novan sezonon. Nun ni rekomendas al la iamaj membroj de Esperanto-Societo "Bude Borjan" membriĝi en iun el la zagrebaj Esperanto-societoj (ekz. Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj) aŭ fariĝi individuaj membroj de **Kroata Esperanto-Ligo**.

Septembre tamen okazos unu programero kiu omaĝos al multjara agado de **Esperanto-Societo "Bude Borjan"**: la 17an de septembro dum **Renkontiĝo de verkistoj** rusa kanzonisto **Mikaelo Bronŝtejn** koncertos honore al **Esperanta-Societo "Bude Borjan"**. Ne perdu la okazon!

S. Štimec

JUBILEO DE LUCIJA BORČIĆ

La 26an de julio 1921 en **Podšpilje** sur la insulo **Vis** en la familio de esperantisto **Ante Borčić** naskiĝis la filino **Lucija**. En julio 2011, dum ni kongresis kopenhage, **Lucija Borčić** atingis la rondan vivjubileon, la 90an naskiĝtagon. **Tempo** gratulas al la jubileanta **Lucija** per rozo titolpaĝe kaj per la foto de Mirjana Žeželj sur kiu Lucija en sia hejmo subskribas la 10an de februaro 2010 siajn du ĉefverkojn, du **Grandajn Vortarojn de Esperanto**. La vortaroj interpretentaj Esperanton en la kroata lingvo estas unika monumento al la vivo de **Lucija Borčić**. Ŝian vivon ĉiam akompanis poezio. Propraeldone ŝi publikigis lastatempe la poemaron **Reminiscenco**, el kiu ni plukas soneton **El la triaaĝa perspektivo**, levante glason por **Lucija Borčić** kaj por ĉio kion ŝi faris en la kroata kaj internacia Esperantujo!

S. Š.



EL LA TRIAAĜA PERSPEKTIVO

La unua kaj la dua aĝ' de l' vivo
rigardata el la perspektivo
de la tria, aŭ eĉ post la tria,
ŝajnas aparteni al mondo alia.

Ĉu estas ĝi vero, aŭ nur reliefo
de l' iama sonĝo, somnolita revo,
aŭ ies alies surterad' ĝi estis,
kiu tiun paseon vivi sugestis?

Ĉiam pli rapide ŝanĝiĝas la mondo,
aperas novaĵoj, malaperas moroj.
Nin surversas novaj ŝokfrapantaj ondoj.

La generacioj plue dislontanas.
Restas nur memore bildoj kaj odoroj,
ia nostalgio. Ni ja veteranas.

Lucija Borčić

NEKROLOGOJ

JANJA DOTLIĆ (1935 - 2011)

En **Kastav** la 21an de januaro 2011 forpasis samideanino **Janja Dotlić** (naskiĝnome **Bogdan**). Ŝi naskiĝis la 19an de oktobro 1935 en **Ostrovica** apud **Gospić**. Ŝi estis profesorino de literaturoj kroata, serba, bosnia kaj montenegra kaj instruis kroatan aŭ serban lingvon kaj kroatan kaj sudslavajn literaturojn en Mezlerneja teknika centro en **Rijeka**.

Esperantiĝis en **Koprivnica** en 1950. En 1954 ŝi lernis Esperanton en Instruista Mezlernejo en **Gospić** ĉe prof. **Miroslav Vrabec**. De 1956 ĝis 1962 ŝi estis membro de **Esperanto Societo "Adriatika Stelo"** en **Pula**, kaj ekde 1964 ĝis sia morto membro de la nuna **Esperanto Societo Rijeka** en **Rijeka**.

Ekde sia esperantistiĝo, ĝis sia morto ŝi restis fidela al siaj idealoj inter kiuj ankaŭ al esperantismo.

V. M.

MARČELO TRAMPUH (1951- 2011)

En **Kaštelir** la 26an de majo 2011 forpasis samideano **Marčelo Trampuh**. Li naskiĝis la 21an de septembro 1951 en **Kaštelir**. En **Rijeka** li finis Turisman Altlernejon kaj atigis fakan diplomon de ekonomikisto por turismo kaj hotelismo. Li laboris plej longe kiel turisma gvidanto, sed ankaŭ okupiĝis pri vinber- kaj olivkultivado, kaj en tiuj branĉoj atingis rimarkindan sukceson akirinte multajn diplomojn por alta kvalito de siaj produktoj. En tiuj laboroj multon helpis al li lia edzino Kata.

Lia esperantista laboro komenciĝis en 1970 jaron en Esperanto societo en **Rijeka**, kie li finis Esperanto-kurson. De 1974 ĝis 1978 li gvidis plurajn Esperanto-kursojn por komencantoj. Post translokiĝo al **Kaštelir** li flegadis kontaktojn kun esperantistoj en la lando kaj en la mondo. En la bieno de familio **Trampuh** en **Kaštelir** okazadis pluraj renkontiĝoj de esperantistoj el **Rijeka**, **Triesto**, **Istrio** kaj eksterlando. De tempo al tempo ĉe la familio **Trampuh**



Foto el la arkivo de DEC

estis tiom da esperantistoj ke renkontiĝoj aspektis kiel malgrandaj kongresoj. Dum tiuj renkontiĝoj estis kutimo planti olivarbojn nomitaj laŭ urboj aŭ landoj el kiuj venis esperantistaj vizitantoj. En lia bieno estas ankaŭ olivarbo kun nomo de urbo **Kawasaki** el **Japanio**, kiu estas ĝemelurbo de urbo **Rijeka**. Malmultaj scias ke la ĝemeliĝon de la du urboj fakte komencis esperantistoj de **Rijeka** kaj **Kawasaki** kaj ke en tiu kunlaboro partoprenis ankaŭ **Marčelo**.

Ekde sia esperantistiĝo ĝis sia forpaso li estis fidela al esperantismo kaj estis regula membro de **Esperanto Societo Rijeka.**

V. M.

ĐURO KALAČIĆ (1906 – 2011)

En **Njivice** dum printempo 2011 forpasis la plej aĝa esperantisto en **Kroatio**. Li naskiĝis la 26an de decembro 1906 en **Ćilipi**. Laŭ profesio li estis aŭtomekanikisto, sed laboris ankaŭ kiel komercisto, taksi-ŝoforo kaj luiganto de ĉambroj al turistoj. Antaŭ la Dua mondmilito li laboris en fabriko de alkoholo en **Zemun**. Li estis esperantisto ekde 1924 kaj lernis Esperanton ĉe kursgvidanto **Ivo Kirilanović** en **Ćilipi**. Ekde 1933 li estis membro de **Esperanto Societo** en **Zemun** kaj daŭrigis lerni Esperanton en **Zemun** ĉe **Mehmed Jakupović**. Al **Zagrebo** li venis en la jaro 1953 kaj al **Njivice** en 1973. Post aktiva laboro li emeritiĝis. Membro de **Esperanto Societo Rijeka** li estis ekde majo 2009.

V. M.

LA TRIA BOATADO SUR LA RIVERO KUPA

Esperanto-Societo Sisak per ties prezidanto **Srećko Radulović**, kunlabore kun **Esperanto-Societo Viktor Mihovilić** el **Karlovac** kaj **Esperanto-Societo Mondo Paca** el **Velika Gorica** organizis por la tria fojo la boatadon sur la rivero **Kupa**, inter la urboj **Karlovac** kaj **Sisak**. La boatado okazis inter la 1a kaj 5a de aŭgusto 2011, omaĝe al la ŝtata festotago Tago de la venko kaj patrujdanko kaj Tago de la kroataj defendantoj.

Unu de miaj lastaj tagoj de la ĉi-jara feriado en **Kroatio** mi decidis pasigi kun esperantistoj kaj mi aliĝis al la boatado la 4-an de aŭgusto kun **Stjepan Žarina** kaj **Stipe Mujić**.

La rivero **Kupa** proksimas en la vilaĝo **Letovanić**. Tri boatoj atendis, kun la eta teamo servinta bongustajn fazeolojn. Baldaŭ ni direktiĝis al **Petrinja** per tri boatetoj kune ligitaj. Sur tiu meza - troviĝis la stangetoj kiuj tenis la skribaĵon - **3a Esperanto- boatado sur la rivero Kupa.**

Mi admiris la naturon ĉirkaŭ ni. Diversaj birdoj venis kapti ranojn, ĉar ĉeborde estis sablaj plaĝoj. Birdoj longkruraj havis sian paradizon. Aliaj ĉasbirdoj ĉirkaŭflugis en alteco. Ekregis nekredebla silento: la motoro paneis. Ni devis remi. Oni aŭdis ĉiun remiltuŝon ĉe la akvo. La knaboj lerte riparis la motoron kaj ni daŭrigis al la direkto de **Petrinja**. La boato kie mi sidis iom post iom lasis la akvon tra du etaj truetoj kaj post iom da tempo, mia tasko estis forĵeti la akvon. Mi sentis min kiel utila maristo.

Ho ve, kio okazas? Motoro denove paneis kaj ĉi-foje ne eblis ripari ĝin ĉar unu peco falis riveren.

Feliĉe la organizantoj havis remilojn por ĉiu pasaĝero. Ni maltrafis viziti la fabrikon **Gavrilović** pro malfruo. Ni maltrafis la urbotrarigardon de **Petrinja**. Fine, ni atingis celitan lokon **Brest**. Ni ne maltrafis solenan alporton de floroj kaj kandeloj ĉe la monumento al junuloj kiuj mortis en la lasta milito.

Loĝantoj de Brest organizis por ni vespermanĝon kun muziko kaj danco. Ili ebligis al ni ankaŭ festparoli pri Esperanto kaj nome de **Kroata Esperanto-Ligo** por urbaj bibliotekoj de **Brest** kaj de **Petrinja**, mi transdonis instrulibrojn pri Esperanto laŭ la **Zagreba metodo.**

Neforgesebla tago, mia unua sperto de boatado. Mi adiaŭis.

La morgaŭan tagon finiĝos la botado en **Sisak**. Multaj aliaj boatoj tie aliĝos al nia boato. Tie salutos la urbestro de **Sisak Dinko Pintarić** kaj atendos reprezentantoj de la estraro de Kroata Esperanto-Ligo kun prezidantino **Judita Rey Hudeček**, vic-prezidanto **Radenko Milošević** kaj membro **Zlatko Hinšt**.

Zdravka Metz

VODNIKOVA 9 – NIA ESTONTA EJO

601. Jelkica Glumičić	13,54 eŭroj
602. Đurda Štokić	13,54 eŭroj
603. Mirjana Žeželj	27,08 eŭroj
604. Bojana Đuričić	27,08 eŭroj
605. Jure Lipovac	100,00 eŭroj
606. Stjepan Žarina	2,00 eŭoj
607. Anto Mlinar	81,24 eŭroj
608. Spomenka Štimec	6,77 eŭroj
609. Anonima	4,01 eŭroj
610. Denis Haziri	50,00 eŭroj
611. Olga Štajdohar-Paden	13,54 eŭroj
Post decembro kolektite	**338,80 eŭroj**
Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj	**26.924,99 eŭrojn!**

En la jaro 2011 ni repagis nian krediton al Universala Esperanto-Asocio!

En la jaro 2010 kaj 2011 ni repagadas nian krediton por centra hejtado, muntita en Vodnikova en 2009.

Nia granda kredito reduktiĝis al **24.420,70 eŭroj.**



La premiitoj kun siaj diplomoj,
fotitaj de Boris Di Costanzo



9. kongres hrvatskih esperantista
9-a kongreso de kroataj esperantistoj
BJELOVAR **2011**

Fotis Jozo Lovrić